

Ne estu koko... venu al KKPS!!!

De la 1-a ĝis la 3-a de Novembro 2013 okazos jam la dua **KlaĉKunveno PostSomera**.

Internacia organiza teamo bonvenigos vin en **Werkhoven (NL)**, proksime de Urecht.

Estos prelegoj, klaĉoj, ekskurso al Amsterdamo, muziko, kaj ĉefe...ludoj!

La programo komenciĝos vendrede posttagmeze, sed se vi volas resti kelkajn tagojn antaŭe aŭ poste, ni klopodos aranĝi gastigadon por vi.

Vizitu nian retpaĝon <http://kkps-klacxkunveno.wikispaces.com>, restu ĝisdata pri la novaĵoj en la Facebook-paĝo de la evento, marku la datojn en via agendo, kaj aliĝu!

La organizantojn vi povas kontakti per la retadreso: kkps.klacxkunveno@gmail.com.

Kotiztabelo en eŭroj (post la 1-a de aŭgusto vi pagos €10 pli):

aĝo/lando	NL/BE	Riĉa Eŭropo	Aliaj landoj
> 30	50	45	40
15-30	40	35	30
3-15	30	30	25
< 3	10	10	10



Aliĝu, aŭ Poso ploros!

Riĉa Eŭropo: AD, AT, UK, DK, FI, FR, DE, ES, IR, IS, IT, LI, LU, MT, MC, NO, PT, SE, CH, kaj nerekonitaj ŝtatoj en la teritorio de tiuj ŝtatoj.

Persona nomo: _____ Familia nomo: _____

Ŝildnomo: _____ Naskiĝdato: ____-____-____ Sekso: _____

Retpoŝtadreso: _____

Loĝlando: _____ Forstreku: ĉionmanĝanto / vegetarano / _____

Preferas loĝi kun: _____ Volus karavani el: _____

Programkontribuoj/klaĉoj: _____

Mi antaŭpagis €15 al _____, aŭ pagos al la uea-konto de NEJ: nejk-r aŭ la bankkonto de NEJ: (IBAN: NL85 RABO 0147 9494 24; BIC: RABO NL2U).



Pos-Amiko

Somero 2013, Numero 5

INDEKSO:

- Itala kantisto minacas homkapti esperantistojn...1
- Zorgiga kresko de SES...2
- Eŭropaj fervojoj timas bankrotiĝon pro trajnkaravanoj.....2
- Amikejo sin deklaras sendependa.....3
- El la tombo de Zombenhof.....3
- Horoskopo.....3
- EVENTOJ..... 4

Itala kantisto minacas homkapti esperantistojn.

Granda timo en la Esperanta komunumo ekde kiam, komence de Junio, la itala kantisto Lorenzo Cherubini (plej konata kiel "Jovanotti") dissendis pere de video minacon forrabi unu aŭ pliajn esperantistojn.

La mesaĝo ne lasas spacon al interpreto: "Mi prenos vin kun mi" (vidu foton). Tamen restas mistero la kialo, kiu igas la famulon antaŭplani tian krimon, kaj anonci tion publike. Eksa repisto, aŭtoro de engaĝitaj kontraŭmilitaj pecoj kaj de la plej romantikaj amkantoj, Jovanotti estas ankaŭ la kreinto de sendepeda muzika eldonejo, kiu ofte donas spacon kaj videblecon al novaj talentoj.

Tiuj ĉi biografiaj elementoj altiras sur lin la suspektojn pri la incendio, kiu en septembro 2011 trafis la ejon de Vinilkosmo, la plej granda eldonejo kaj vendejo de Esperanto-muziko. Flo Martorell komentis: "Mi ne kuraĝas aserti ke temas por certe pri krima klopodo damaĝi la Esperantan muzikon. Tamen la koincidoj estas pensigaj kaj maltrankviligaj. Ja lastatempe kreskas la kvanto kaj la kvalito de la Esperanta produktado, kio evidente povas krei zorgojn kaj ĵaluzojn, kaj kaŭzi tiajn epizodojn de nelojala konkurenco." Dume la polico enketas.



Ligoj inter Jovanotti kaj la konata homkaptinto Gijom estas ankaŭ esplorataj (vidu la pasintseman epizodon pri la malapero de Platano). Kiel preventa rimedo, kelkaj el la plej konataj E-artistoj estos fermitaj en sekura loko, onidire en Nederlanda bieno.


ANONCO

Volontuloj serĉataj por eksperimento pri ligo inter teo kaj ebrieco en slovakaj urboj Martin. Interesiĝantoj respondu al D-ro B. Telo.

SES konkeras la mondon.

La sukceso de SES (infanvartejo de E@I) de pasintaj jaroj gvidis al decido en 2014 organizi SES en tri lokoj. Tio ŝajnas bona novaĵo, sed matematika analizo de la scienca redakcio de la PosAmiko

montras ke tiu ĉi ne estas daŭripova evoluo. Vidu la apudan grafikon. La formulo, kiu plej bone priskribas la nombron da SES-oj en iu jaro inter 2007 kaj 2014 estas $\text{Exp}(\text{Exp}(\text{jaro} - 2014))$. Laŭ tiu formulo en 2015 estos 15 SES-oj, en 2016 1618, kaj en 2017 pli ol duona miliono! Ĉu do en 2017 okazos la fina



venko, aŭ ĉu antaŭ tio SES kolapsos pro ĝia propra sukceso?

Eŭropaj fervojoj timas bankrotiĝon pro trajnkaravanoj.

La eŭropa ekonomia krizo eniras novan ĉapitron kun la publikigo de zorgigaj rezultoj de la grandaj fervojaj kompanioj en Eŭropo. Germana DB, franca SNCF, slovakaj ŽSR: ili estas nur kelkaj el la multaj kompanioj ĉe la rando de bankroto. Unu el la plej estimataj spertuloj pri la fervoja sektoro, prof-ro L. K. Motivo, en la lasta numero de Scienca Revuo raportis pri la fenomeno, indikante kiel ĉefan kaŭzon la tiel nomatajn "trajnkaravanojn" de esperantistoj. Per tiu grupa formo de vojaĝado junuloj ŝparas centojn da eŭroj, kiujn la kompanioj ne ricevos. Krome la grandaj grupoj fortimigas normale pagantajn vojaĝantojn, kaj ilia pezo malrapidigas trajnojn kaj fuŝigas la horarojn. La Pos-Amiko sukcesis intervjui unu el la (francaj) organizantoj de tiel nomataj karavanoj, sub kondiĉo de anonimeco:

Poso: "Kiel vi komencis tiun ĉi danĝeran agadon?"

A: "Mi simple enuis vojaĝi sole, kaj provis trovi akompanon por atingi KKPS-on."

Poso: "Ĉu estas via intenco bankrotigi la fervojkompaniojn?"

A: "Tio estis neniam la intenco, ni ankaŭ bezonas ilin. Sed se necesos, ni starigos nian propran kompanion. Ni jam trovis kelkajn ĉeĥojn, kiuj volonte stirus niajn trajnojn."

La kompanioj nun esperas por nova leĝaro de la Eŭropa Unio kontraŭ tiaj ĉi praktikoj. Se ne, trajnvojaĝoj povus malaperi post novembro 2013.

Amikejo sin deklaras sendependa.

La sendependiĝa solenaĵo okazos precize 105 jarojn post la unua sendependa deklaro je la 13-a de Aŭgusto 1908. Reprezentantoj de la nova ŝtato invitas ĉiujn veni kaj kunporti flagojn kaj armilojn.

El la tombo de Zombenhof.

Por ke lingvo estu internacia, ne sufiĉas nomi ĝin tia. Kaj por ke gazeto estu serioza, ne sufiĉas nomi ĝin serioza. Mi volas uzi miajn dek centimetrojn da spaco en tiu ĉi gazeto por gratuli Poson kaj lian redakcion pri la unujariĝo de la Pos-Amiko. En tiuj dek du monatoj la apero havis vastan pozitivan efikon al la esperantista komunikilaro: Libera Folio re-noviĝis, Kontakto festis jubileon, Muzaiko daŭre kreskis, Vinilkosmo lanĉis novajn diskojn, la Heroldo ĉesis aperi, aktuale.info preskaŭ pretas, kaj se la unua PosAmiko aperus kelkajn monatojn pli frue, verŝajne ankaŭ Nunonia ankoraŭ ekzistus nun. Esprimu ankaŭ vi vian dankon al Poso, per legi la PosAmikon kaj pludoni ĝin al viaj geamikoj.

-Lazaro Zombenhof

La horoskopo.

Ŝafo: Vi havas dum tiu ĉi somero altan riskon je ĵonglado.

Taŭro: Plej bona kunloĝanto por vi estos akvisto.

Ĝemeloj: Vi malkovros, ke pli interesas kanabo ol Kanado.

Kankro: Ne restu hejme ĉirkaŭ halovino.

Leono: Poso estos via spirita protektanto dum akvobataloj.

Virgulino: Post la novula programo vi ne plu estos.

Pesilo: Via nova religio malpermesas humuron kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Atentu ne konfuzi tatran kaj alian teojn, ĉefe matene.

Aleks Kadar: Vi rompos mondan rekordon pri kalkuli pluverojn.

Sagitario: SES estas bona tempo por diligento, sed eĉ pli por diboĉsento.

Kaprikorno: Se vi ne povas dormi nokte pro bruo, provu dormi en kinejo.

Akvisto: Evidente kripojn kaj taŭrojn dum viaj ferioj.

Fiŝoj: Nazfluto ne validas por ricevi muzikilan rabaton.